

Intervjuo kun Olivier Tzaut pri lia instruado de Esperanto
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 699, 1977.03.02 & 04 & 05

Cl.- Parolas Claude Gacond, kiu intervjuas Sinjoron Olivier Tzaut, la sekretario de la kampanjo 'Esperanto en la lernejojn'. Sinjoro Tzaut, ĉu vi povas hodiaŭ rakonti pri la Esperanto-kursoj, kiujn vi nuntempe gvidas aŭ iniciatis ?

OT.- Ekzistas tri tipoj da ili : 1. Estas kursoj otganizitaj en la kadro de la perfektigo de la instruistaro. Tiaj kursoj ekzistas nur en du kantonoj, Berno kaj Ĝenevo. Ili estas unusemajnaj kursoj. En la kantono Berno jam de tri jaroj oni proponas da ili kaj pluraj dekoj da instruistoj partoprenis ilin. En Ĝenevo nur unu okazis ĝis nun. 2. Dua tipo : la kursoj en popoluniversitatoj. Ili ekzistas nur de unu jaro kaj okazis aŭ okazas en kvar lokoj. 3. Tria tipo : okazas nunmomente unu kurso en la mezlernejo de Moutier. 25 infanoj partoprenas ĝin.

Cl.- Ni parolu pri ili unu post la alia.

OT.- Jes. La kursoj oficiale proponitaj en la kadro de la perfektigo de la instruistaro okazas dum la ferioj paskaj, someraj aŭ aŭtunaj. Ili daŭras kvin tagojn. La nombro de la partoprenantoj varias inter 8 kaj 12. En unu semajno, per aŭdvida instruado, programita kurso, dialogoj kaj nun per perflanela instruado, la partoprenantoj povas atingi interesajn rezultojn. Sed la problemo estiĝas, kiam finiĝas la kurso. Estas malfacile trovi kontentigan solvon por daŭrigi la lernadon. Pli kaj pli mi proponas al la homoj partoipreni poste semajnfinaĵn seminariojn en la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Ĝia nun ni devis konstati ke almenaŭ la duono el la partoprenintoj ne daŭrigis vere la studadon.

Cl.- La dua tipo da kursoj estas la popoluniversitata, ĉu ne ?

OT.- Ni havas da ili nur de unu jaro en kvar urboj. Povus esti pli da kursoj, se estus aliaj profesoroj pretaj por instrui. Certa nombro da ili sin preparas sed ne vere pretas. Ĉiufoje oni aliĝis por dek lecionoj. La prezo dependas de la loko. Poste, se restas sufiĉe da partoprenantoj, oni povas havi duan kaj trian seriojn. Sed estas grava perdiĝo. La ĉefa kaŭzo estas la tro-okupiteco de la homoj. Ili baldaŭ ekkonscias, ke se Esperanto estas multe pli facila lingvo ol la aliaj, oni tamen devas dediĉi al ĝia lernado minimuman tempon ĉiutage. Kaj tie kuŝas la malfacilaĵo.

Cl.- Ĉu estas aliaj kaŭzoj de perdiĝo ?

OT.- Jes : estas la malsano, la translokiĝo, kaj tiel plu.

Cl.- Kio estos laŭ vi la ideala solvo ?

OT.- La ideala solvo ? Devus esti sufiĉe da aliĝantoj por povi fari homogenajn klasojn. Ni farus du grandajn kategoriojn : kategorio A) la homoj kiuj havas firman lingvistikan bazon, kategorio B) la homoj, kiuj devus unue lerni, kio estas substantivo, adjektivo, rekta komplemento kaj tiel plu. Poste ni farus en ĉiu kategorio du subkategoriojn : unu por la homoj, kiuj deziras rapide ellerni la lingvon dediĉante sufiĉe da tempo al la studado ĉiutage – kaj alian por la homoj, kiuj havas malmulte da tempo kaj progresas fakte ĉefe dum la lecionoj.

Cl.- Kaj en la mez-instruado ?

OT.- Jes, mi havas kurson en mezlernejo de ... de 76. Sed la kurso ne estas oficiala. Antaŭe la direktoro organizis prelegon kiun partoprenis la gelernantoj de la unua grado. Ili do havas 11 jarojn. 87 infanoj ĉeestis kaj 30 el ili elektis la kurson, kiu estas senpaga. Tiu ĉi okazas lundon posttagmeze, kiam la infanoj malfeliĉe jam havis sep lecionojn. Do, entute ili havas naŭ lecionon tiun tagon. Kompreneble ili estas lacegaj kaj tre malfacile estas kapti ilian atenton. Krome ili havas multege da hejmaj taskoj, kaj aparte por mardo. Tio klarigas la fakton ke jam tri el ili forlasis la kurson.

Cl.- Ĉu vi povas doni al ili hejmtaskojn?

OT.- Oh, ne. Aŭ: tre malmulte. Se ne, multe pli da infanoj forirus.

Cl.- Kiel vi ŝatus povi instrui Esperanton ?

OT.- Estas tute simple : en normalaj kondiĉoj. Tio estas : en la normala programo, je normalaj horoj. Ĉar vere, la instruado de Esperanto al infanoj post la kvara posttagmeze, infanoj, kiujn amaso da taskoj atendas je la rehejmiĝo, estas vere malfacila kaj seniluziiga tasko.

Cl.- Ĉu vi havas problemojn rilate al la diversaj kursoj ?

OT.- Jes, ho jes. La transportado de la necesa materialo estas granda problemo. Mi nepre bezonas aŭton. Kaj ĉion preni estas granda laboro. La idealo estus ke ĉio, aŭ almenaŭ la aferoj pezaj aŭ kiuj prenas lokon troviĝu jam en la klasĉambro.

Cl.- Ĉu vi havas precizan celon?

OT.- Jes, mi dezirus kiel eble plej rapide fari oficialan instruadon, dum kiu la infanoj estus regule testataj. Nur kiam mi havos sciencajn esploron, mi povos pruvi ion.

Cl.- Kiel vi pretigas vian instrumentodologion?

OT.- Mi regule sekvis kaj sekvas la pedagogiajn seminariojn de la Kultura Centro Esperantista. Tie tre efika metodologio estas elaborita.

Cl.- Kaj ĉu vi rekomendas al instruistoj eklerni la lingvon samtempe kiel la gelernantoj ?

OT.- Ho ne, tute ne. Se oni volas malutili al Esperanto, oni faru tion. Laŭ mi la instruisto devas flue paroli la lingvon, kiel eble plej internacie elparoli ĝin kaj esti ricevinta tre seriozan metodologian preparadon.

Cl.- Lastan demandon : ĉu vi kantigas la gelernantojn ?

OT.- Jes, multe. Ili tre ŝatas tion kaj tio estas la plej bona rimedo por alkitimiĝi al ĝusta akcentado de la vortoj. Sed estas problemo. La plimulto el la kanzonoj en Esperanto tro ofte ignoras tiun esencan regulon de korekta akcentado. Kaj tiam, kantante oni nur alkitimiĝas al fua akcentado.

Cl.- Vi aŭdis intervjuon el Svislando. Claude Gacond parolis kun sinjoro Olivier Tzaut, la sekretario de la kampanjo 'Esperanto en la lernejoj'. Ĝis reaŭdo! Post tiu intervjuo vi aŭdu kanzonon kantitan de Olivier Tzaut.

OT.- Temas pri usona kanzono, kanzono de ministoj: 'Dekses tunoj'. (muziko)